7-a JARO, N-o 330

LEIPZIG, 29. / 1. 1931



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

La malpermeso al "En la Okcidento nenio nova" — akuzo kontraŭ la germana naciismo

Enradikiĝis antaŭjuĝo ankaŭ en Usono kontraŭ enlandaj usonaj filmoj ĉe la prudenta parto de l' publiko. Estis rimarkeble ia tendenco, kiu preferis eksterlandajn filmproduktojn. Inter ili la sovetiaj konkeris unuan lokon, evidente pro la temoj priskribantaj realajn okazojn, kiuj formas kvazaŭ la skeleton de tiuj filmoj. Sed la filmigo de l' Remark-a libro konvinkas, ke ekzistas temoj, kiuj ne donas ŝancon al usonaj filmproduktistoj kirli ilin je iu sentimenta artkaĉo.

Se oni tenas suspekton ĝenerale kontraŭ la diroj de varproduktistoj kiel servantaj nur por la vendado de propraj varoj, tiuokaze la kutimaj anoncfrazoj tamen vole-nevole trafas la veron. La filmfabrikisto *Lemle* (Laemmle) do diras ion, kion oni volonte substrekas: "Ni konsideras tiun ĉi filmon distinga faro dum 25 jaroj en la movbildkomerco." . . . Kiuj vidis la filmon, tiuj ankaŭ komprenas, ke la akademio por filmarto k scienco, konsistanta el fabrikistoj, direktoroj k teknikistoj (600) en la usonaj filmrondoj voĉdonis prezenti orpremion al la filmigintoj.

Eĉ se oni ne kredas, ke milito estas forigebla el la mondo per propagando, tamen oni povas aklami ankaŭ la proponon de la demokrata *La Mondo* ('The World'), metropola gazeto: nomi Remark kanditato por la Nobelpacpremio, pro liaj meritoj por la helpo al paco.

Oni kelkloke argumentis, ke la efiko de "tiuj ĉi burĝaj filmoj estas tre limigita", k ke "kelkaj el la filmoj eĉ fortigis la romantikon pri la batalego k la buĉado en nematuraj kapoj, la junularo el larĝa tavolo jam infektaĉita de la nacisocialista militludado apenaŭ sentis fortimigon sekve de ili".

La filmo "En okcidento nenio nova" certe ne postlasas impresojn, kiuj pravigas tiun kutime ĝustan opinion. Oni devas vidi ĝin! Ĝi staras sur la sama nivelo kiel verkoj en la "burĝa" literaturo, kiuj profunde efikas sur la spiriton de donita epoko (ekz. ĉi-lande "La Ĝangalo" de *Aptn Sinkler* (Upton Sinclair) eldeviginta reformojn).


La Hitler-aj ratoj svarmas, triumfante, sur la granda soldata boto (simbolo de l' militfilmo "En Okcidento nenio nova", kiun ili malpermesigis)

Se oni ne konus la universalan bonakcepton al la Remark-a libro k ne memorus, ke kapitalistoj riskas ĉion por la profito, oni demandus sin serioze, kial oni produktis filmon, kiu endanĝerigas elementojn necesajn por la daŭrigo de l' kapitalisma sistemo.

La scencoj pri kureg-atakoj ne donas lokon al alia impreso ol tiu, ke milito estas infero, el kiu saviĝas eble nur pedikoj. Venkanto ne estas iu franco aŭ anglo, sed militmaterialo. La hommaterialo estas sensignifa. Homoj estas nur ĝenaj obstrukcoj fakte malpli ĝenaj ol pikildrato, — lastaj movfiguroj de la militmaŝino.

La sinsekvaj bildoj marteladas en ĉies cerbon, ke milito semas morton, elektas viktimojn sen konsidero pri heroa kuraĝo aŭ rataĉa malkuraĝo. Ili instruas, ke defendado al la patrio estas belega frazo en la buŝo de la katedro- k biertablopolitikisto, sed por la soldato grimacaĉas post ĝi nur la falĉulomorto, sen konsidero pri nacieco. — Ĉu filmo povas esti pli kontraŭmilita?

Estas nenia sceno en ĝi, kiu entuziasmigus al volontuliĝo.

Kial do ĝi difektas la prestiĝon de la germana nacio, kiel asertas la registaraj cenzuristoj k ŝovinistoj en Germanio-Aŭstrio?

Al francaj k germanaj soldatoj nepridubeble estis komuna la malsekiĝo de la pantalondorso, kiam ili aŭdis la furiozadon de l' bar-pafegado. . . . Inter atako, forkuro, reatako k aliflanka forkuro estas rimarkebla justa ekvilibro.

Eble Himelŝtos estas la ŝtono de l' ĉagreno. Sed tiu tipo de kaporalo estis tiom unika zoologiaĵo, ke, kvankam esence simila al ĉiuj samranguloj alilandaj, ĝi tamen maltrafas la celon veki malamon; male, ĉar ĝi estas tiom malkredebla por civilulo, ĝi elvokas amuzon, kiel mi povis konstati en *Brodŭe* (Broadway)-teatro.

Alia tipo estas la superlerneja instruisto, supertipo de ŝovinisto. Li ludas rolon en ĉiu nacio k en Usono, sentante sian mision, preparas generacion por nova militiro. Ĉu ne estas bone ĝin kontraŭefiki? Estas la granda makulo de l' civilizo, ke ĉiu-

landaj instruistoj k per spirita gvidado komisiitaj personoj tiom ege subiĝas al evidente tre materiaj konsideroj. Ĉar ili ekzistas ĉiutempe k ĉiuloke, ankaŭ el tio ne estas konstruebla domaĝo al la reputacio germanpopola (Tamen oni eble povus ŝtopi naztukon en la buŝon de *G. Haŭptman* [Hauptmann], kiu estas malbona advokato por la filmo en la memoro de tiuj, kiuj ne forgesis lian famaĉan milit-instigan poemon).

La usona gazetaro trovis ĝenerale nenion malgloran por Germanio en tiu filmo.

Lemle, la fabrikinto, diris: "Neniu povas konsideri ĝin atako al la germana popolo." Male, oni povus admiri, ke homoj eltenadis tiajn terurojn.

Oni asertas ĉiuflanke, ke la filmo naskis fortan simpation al Germanio, k tiun aserton subtenas multaj rimarkigoj en la gazetaro. Laŭtiĝis k multiĝis pro ĝi vokoj ŝanĝi la packontrakton de Versajo (Versailles) k la kondiĉojn pri pago de l' riparŝuldoj.

Sed la malpermeso ŝanĝis, kiel fulmotondro, la situacion. La tre favora impreso pri la germana popolo faris lokon al nekredeble malfavora.

V. R. Herst (Hearst), kiu regas super centoj da gazetoj, porgermana pledanto, en speciala artikolo esprimas sian ĉagrenon pri la malpermeso, akcentas la neceson de ŝanĝoj en la packontraktoj k konkludas riproĉtone: "Ĉiu agilo, kiu tendencas akceli la pacon, devus esti aprobata, instigata k protektata de saĝa, konscienca k antaŭvidema registaro".

Sed pli ol estas legeble en gazetoj, valoras aliaj faktoroj. La malpermeso reagis favore al reapero de l' kinaĵo sur Brodŭe k ceteraj Ĉefstratoj kun iliaj naivaj patriotoj en la usonaj urboj. Anoncistoj altiras la amasojn per la krioj: "Malpermesata en Germanio; la vero pri la milito", k. s. Kiam mi eniris la kinejon, elvenis virino, kiu elvokis profundemocie: "Kaj tiu ĉi popolo volas ree militiri". Plena konsterniĝo k nekredemo sonis el ŝia voĉo.

Estas mia persona opinio, ke en la pensoj de rigardintoj devas leviĝi profunda indigno kontraŭ tiun parton el la popolo, kiu instigis al la malpermeso k kontraŭ la alian parton, kiu toleras, ke ĝia registaro juĝas ĝin gardinda "kontraŭ atakoj al la germana honoro."

Por iel mezuri la gradon de l' domaĝo, ŝajnas ne troigo juĝi la malpermeson kiel havanta eble eĉ pli malutilajn sekvojn ol la torpedumo al la *Luzitania*. Alilandaj ŝovinistoj ne bezonas ekveki la dummilite breditan kredon, ke germanoj estas "hunoj", barbaroj; tiun aferon ja prizorgas fakte la nacisocialistoj germanaj.

Malpermeso al verko elvokanta abomenon kontraŭ reciproka sistema murdado ne povas havi alian efikon ol veki suspekton al la koncernaj malpermesantoj pri murdavido, pri militemo.

Estas ĝuste tiaj aferoj, kiuj efikas nemezureble, nevideble k formas la elementojn de l' ŝovinismo. Subite la torento elverŝiĝas k portas la homan socion, direktatan de profitinteresoj, al la rando de l' komuna pereo. Sen sentimento eĉ plej potencaj kapitalinteresoj ne povas puŝi popolojn en militon.

La nacisocialistoj liveris al la "malamiklandoj" fortegan argumenton por nova militiro kontraŭ la "germanaj barbaroj". La malpermeso de l' registaro prirespondigas la tutan nacion, sidigante ĝin sur la akuzbenkon antaŭ la tribunalo de l' mondopinio. La klasbatala proletaro ne povas malinteresiĝi pri tiu venko de faŝistoj sur kultura fronto, kvankam la ekonomia batalo en Germanio nuntempe staras en la unua vico.

INO-KOR (1307), Novjorko.

Unu el la interesegaj popular-sciencaj broŝuroj eldonitaj de SAT-Kooperativo estas

SEKSPSIKOLOGIO

Originale verkita de S. ZIEGLER.
Serioza traktaĵo bazita sur la esploroj de la moderna psikoanalizo. 54 pĝ. Form. 11×14 cm. Prezo 0,60 mk. g.
Administrejo de SAT, Colmstr. 1
Leipzig O 27.

Hispanio — ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ

(1. daŭrigo. Vd. n-on 327.)

Dua periodo: Kreado de organizoj por starigi komplete pacon k trankvilon

a) por la kapitalistoj

Jam estas fermitaj ĉiuj revoluciaj kunvenejoj; sindikatoj k komunista partio estas malleĝigitaj; la pres-organoj konfiskitaj same kiel ĉiu skribmaŝino aŭ io ajn, kio eble konigus al la pacema loĝantaro ion pri la "abomenega komunismo".

"Iom post iom Hispanio transturniĝos en trankvilan k feliĉegan landon. La danĝeruloj jam estas malliberigitaj k punitaj, kiel ili meritas", diradis Primo de Rivera en sia ĵurnalo. "Ili ne plu parolos nek propagandos siajn perfidajn ideojn. Nun Hispanio marŝos ĉe la kapo de l' civilizo . . ."

La revolveruloj jam ne plu pafadis sur la stratoj. Kvankam ili estis ankoraŭ altpagataj, ili ne plu teruris la urbanojn. Tiel la diktatoro k liaj samcelanoj ofte diradis, ke la anarkio jam finiĝis, ke paco k trankvilo estas realaĵoj.

Kiel en Italio, ankaŭ en Hispanio oni kreis organizon por zorgi pri la bonordo ("El Lomaten")[1]. Krome oni fondis politikan partion nomatan "Patria unuiĝo", simila al la faŝista partio italia. Al ĝi devis aniĝi ĉiuj ŝtataj oficistoj, dungatoj ĉe urbdomoj k aliaj, kiuj okupas oficialajn postenojn.

b) por la laboristoj

En siaj paroladoj Primo de Rivera kelkfoje diris, ke li estas vera socialisto. "Miaj agoj tion substrekas," li skribis, "pro tio mi ne nur plibonigos la vivon de l' kapitalistaro, sed ankaŭ la laboristoj estos atente prizorgataj." Tiel la diktatora ministro de l' laboro, s-o Aŭno, "elpensis" organizon, por ke la laboristoj ne plu striku.

Li dekrete kreis la t. n. "Komités paritarios", organizon konsistantan el komisionoj po industrio aŭ metio, ankaŭ po kompanioj, se ĉi tiuj havis grandan nombron da laboristoj en siaj laborejoj, — kiel ekzemple la tramvoja kompanio. Tiuj komisionoj, en kiuj samnombre estas reprezentitaj mastroj k laboristoj, devus diskuti k solvi ĉiujn laborproblemojn (pri salajroj, labortempo k. a.). Sed se foje la afero aperus nesolvebla pro la samnombreco de l' kontraŭuloj, tiam la prezidanto de l' komisiono, apartenanta nek al mastroj nek al laboristoj, sed dungita de la laborministro, decidus per sia justa voĉdono . . .

La "Komités paritarios" estis kreitaj en novembro 1926. Sendube nia "laborista" labor-ministro multege laboris k maldormis por "elpensi" tiun neplibonigeblan organizon kopiitan laŭ simila italia institucio. Tamen la ministra elpensaĵo estis ĝoje akceptata k propagandata. La socialistoj konsilis en sia agitado al la laboristaro akcepti tiun efikan organizon.

Poste estis preskaŭ kvar mil socialistoj dungitaj en la komitat-oficejoj. Kiam funkciis tiuj Komitatoj, la strikoj estis konsiderataj kiel neleĝaj. Tiel la laboristaro perdis sian plej efikan defendilon. La komunistoj ĉiam protestis kontraŭ la starigo de tiu institucio.

[1] Pri tiu civil-gvardio legu en n-o 327 (unua parto de l' artik.). — *Red.*

c) por la studentoj

La studentaro, tiu aro da "nekonsiliĝemaj" junuloj, ankaŭ estis prizorgata. "Pro la profesoroj, pro la nemoralaj dekatedraj paroladoj, la studentaro tiel furiozas…" diris la nun mortinta diktatoro. Ekzilado de l' plej bonaj profesoroj, plej taŭgaj instruistoj, pro ilia nereligia pensmaniero, estis neprokrastebla afero. Ili estas anstataŭataj de monaĥoj ie k alie aŭ de konservativaj profesoroj.

d) por la tuta hispania loĝantaro

Por plene "moraligi" la loĝantaron, la diktatoroj decidis plibonigi ankaŭ la leĝaran kodon k aperis nova "punleĝara kodo de 1928". Ĝi enhavas interalie la frazon: "Socia danĝerulo" estas tiu, kiu agos kontraŭ la monarkio, k ankaŭ ĉiu liberpensulo." La kodo tute ne punas la drinkulojn, kiuj en Hispanio ofte bategas siajn edzinon k geinfanojn. Ĝi tute ne punas la burĝidojn, kiuj ofte en Hispanio malvirgigas nesciantajn hejmservistinojn, ĵetante ilin poste en la prostituon. Tamen ĝi tre severe punas la revoluciajn agadojn; ĝi rajtigas la policon enkarcerigi revoluciulojn, eĉ se ili estas malsanaj. Ĝi rajtigas la policon peti informojn ĉe la mastroj pri la ideoj de iliaj salajratoj; ĝi rajtigas konfiski k punegi ĵurnalojn, kiuj propagandas la proletan revolucion.

La pravigo de la frazo de Marks

Unu fojon pli praviĝas la frazo de Marks: "La emancipo de l' proletaro nepre estas faro de ĝi mem."

La diktatoreco estis ĝenerale bone akceptata. Eble ne malmultaj hispanoj bonkore kredis la multnombrajn fiskribaĵojn, kiujn la diktatoro publikigis promesante feliĉon k bonstaton al la tuta popolo. Tamen ankaŭ nedifinebla nombro da klaskonsciuloj tre bone komprenis tuj la celojn de Primo de Rivera k liaj kunlaborantoj. Sed ili nenion povis fari por kontraŭstari la diktatorecon. Ĉi tiu stariĝis plenpotence, kun la certigo transformi Hispanion en la plej feliĉan k plej trankvilan el ĉiuj landoj.

Neniam antaŭe Primo de Rivera estis konata en la lando kiel politikulo. Kiam en 1923 li elpaŝis kiel diktatoroĉefo, la granda plimulto el la loĝantaro eble pensis, ke Primo estas nova Moseo, kiu liberigos la malfeliĉajn hispanojn el la ungegoj de alia nova Faraono. Kontraŭe aliaj, kiuj konsciis, ke Primo estas ĉiama militisto k burĝdevena, tute malfidis al liaj promesoj; tia drinkulo-militisto ja ne liberigus la proletojn — tiujn, kies emancipo povas esti nur la verko de iliaj propraj manoj… (Daŭrigota.)

(15 430)

PRI LA GERMANA FAŜISTARO

Ĉar mi nur povas raporti laŭ mia scio, do ne tute objektive, mi petas alian K-don eventuale kompletigi mian raporton por doni konkretan bildon al SAT-anoj alilandaj.

(8381)

1. En la parlamentoj

La parlamentanoj de la "N.S.D.A.P." (Nacisocialista laborista partio germania) faras la samon, kion faras la parlamentanoj de aliaj partioj: nome enspezi monon. En gravaj okazoj ili elpaŝigas la plej bonajn oratorojn (same kiel la aliaj partioj). Se alvenas proponoj profitaj al laboristoj, tiam ili voĉdonas por (kiam ili estas certaj, ke estas plimulto por malakceptigi ilin). Se alvenas propono, kiu malutilas al laboristoj, tiam ili voĉdonas kontraŭ (sed ankaŭ nur, se estas certa plimulto da aliaj parlamentanoj, kiuj akceptigas la proponon). Do ankaŭ en tio ili agas kiel parlamentanoj de aliaj partioj. Se alvenas propono tro ruza, tro malutila por laboristoj, tiel ke neniu alia parlamentano volas voĉdoni por ĝi, tiam ili akceptas ĝin aŭ forlasas dum la daŭro de l' voĉdonado la parlamentejon. Samon oftege faras aliaj parlamentanoj.

2. Gazetaro faŝista

Ĝi havas la taskon planti naciemon en la cerbojn de la legantaro. Kiam okazis batado inter iuj personoj k unu el tiuj personoj havas membrokarton de la Nacisocialista partio k aliaj havas membrokarton de klasbatala partio, tiam oni raportas pri tio kiel pri grandega batalo inter du armeoj.

La fakto, ke laŭ sia konduto ili pli malamas internaciistojn ol eksterlandanojn, devigas min kredi, ke ankaŭ ili nur havas la taskon erarigi la laboristaron. Tre malkaŝe la faŝista gazetaro esprimas la ĉefan celon, t. e. enkonduko de "ĝenerala labordevigservo". Por komprenigi la strangan fakton, ke multaj laboristoj aniĝis al tiu partio, estas necese scii, ke la germanaj laboristoj ne bone regas la germanan lingvon. Ĝi estas tiom malfacile ellernebla, ke mi mem, malgraŭ tio ke mi estas germano laŭ naskiĝo k vizitis nur germanajn lernejojn, ne perfekte povas uzi ĝin. La faŝista gazetaro same kiel aliaj misuzas tiun fakton. Tiel povas okazi, ke gazeto aperigas trifoje la saman artikolon k neniu protestas kontraŭ tia misuzo de gazetpapero. Same kiel ĉe aliaj gazetoj oni konstatis ankaŭ ĉe faŝistaj malharmonion inter la anonca k la ĝenerala parto.

3. "S.A." (Faŝistaj ataktaĉmentoj)

La "S. A." ne estas grand-anara. En nia urbo apartenas al ĝi nur kelkdeko da personoj. Por komprenigi la malgravon de tiu nombro, mi notas, ke nia urbo havas 40 mil loĝantojn. Tasko de la "S. A." estas gardi salonegojn, en kiuj kunvenas la popolo por aŭskulti, kion paroladas tiu aŭ alia oratoro faŝista. (Enirprezo: 0,30 mk. g.). De tempo al tempo la "S. A." manifestacias en filmteatroj kontraŭ tiu aŭ alia filmo. (Negocistoj notu tiun novan rimedon propagandi por filmoj.)

Je la 31. decembro 1930 kelkaj faŝistoj (18 personoj) intencis interrompi prezenton de konata filmo (Drefus). Sed la teatra posedanto donis vangofrapon al unu el ili; poste venis policistoj k la tuta "S. A." forkuris. La filmo nun estas prezentata pli ofte…

SAT-ano 8384

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Porsocialisma varbado per filmoj

Jam ekzistas filmoj, ne enhavantaj kapitalismajn fitendencojn, skizantaj historiajn okazintaĵojn aŭ sociajn problemojn laŭ proleta vidpunkto, sekve uzeblaj por nia klasbatala propagando. Precipe mi pensas pri la sovetiaj filmoj, veraj artaĵoj, vekintaj sensacion en la tuta mondo, aprobitaj eĉ de la sincera burĝa gazetaro. Dum la lastaj parlament-elektoj en Aŭstrio la socialdemokrata partio multfoje prezentigis la revolucian filmon "Kirasŝipo Potemkin" sur publikaj placoj de Vieno k tiel influis la preterirantojn. Certe tiaj filmoj kapablas plenumi klerig-laboron k forpelus fine la stultigaĵojn de l' kapitalisma filmproduktado. Bedaŭrinde la lab. partioj ofte ne sufiĉe atentas tiun gravan propagandilon. En Aŭstrio, kie la soc. dem. partio mem posedas kelkajn kinoteatrojn, ne estas montrataj ĉiuj novaj rusaj filmoj. La bonegan filmon "Turksib" oni prezentis nur, kiam ĝi jam estis videbla en burĝaj kinejoj. La kialo? La soc. dem. partio *ludonis* siajn kinejojn al privatpersonoj, kiuj tute ignoras kulturajn celojn k ludigas sensencaĵojn, se tiuj

Atentigo!

Por prepari novan, plivastigitan eldonon de "PETRO", la uzantoj de tiu ĉi kursa lernolibro bonvolu sendi senprokraste siajn rimarkigojn k sugestojn al: K-do Reto Roseti, 111, High Str., Dunfermline, Skotl., Britio.

garantias al ili pli grandan profiton. Dume la soc. dem. gazetoj plendas, ke en Germanio estis prezentitaj lastjare 20 novaj sovetfilmoj, en Aŭstrio apenaŭ 3, sed oni prisilentas, ke la partio ja povus montri ilin, se ĝi ne estus ludoninta la proprajn kinoteatrojn. *F. S. (16 362), Vieno.*

La terkulturista senlaboreco en Hispanio

Laŭ freŝdata statistiko, estas 140 mil senlaboruloj en la provincoj de Grenado, Jaen, Kadiks, Kordobo, Seviljo k Huelva. Precipe en la provinco Jaen la senlaboreco estas tre sentebla (45 mil personoj), same en Grenado (50 mil.). Ĉar la oficiala statistiko ne enregistras la faktajn nombrojn, oni povas kalkuli, ke en tuta Hispanio nuntempe ekzistas 250 mil senlaboraj terkulturaj laboristoj. Grupo da senlaboruloj manifestaciis je 13. januaro antaŭ la urbdomo en Madrid, postulante laboron; ili retiriĝis antaŭ la polico. *P.*

Por protesti kontraŭ la malpermeso de l' Remark-filmo,

socialistoj el Badenaj urboj (Sudgermanio) aranĝis karavanon al Strasburgo (Francio), kiu lokiĝas apud la germana landlimo, nur dividita per la Rejno, k ĉeestis en tiu urbo prezentadon de tiu en Germanio sub reakciula premo malpermesita kontraŭmilita filmo, aklamante speciale la plej karakterizajn porpacajn scenojn.

La vojaĝo de l' germana kanceliero Brüning al Silezio

havis kiel celon fortigi la germannacian senton kontraŭ la najbara Polio. En ĉiuj industriaj urboj de Silezio, en Bojten, Glajvic, Breslaŭ, Ratibor k. a. Brüning estis akceptata de miloj da laboristoj, kiuj kriis "For la malsatregistaro!" k unufoje lia aŭtomobilo eĉ estis atakata per ŝtonbombardo. La kanceliero, korpremita pro tiuj manifestacioj proletaraj, minacas nun per diktatoraj rimedoj garantii la burĝan ordon en la de grava ekonomi-krizo turmentegata lando. *R. S.*

Admirinda kuraĝo de manifestacianto (Japanio)

Juna laboristo supreniris al la supro de 45 metrojn alta kamentubo de Kaŭasaki Fabriko ĉe Fuĵi-Ŝpinkompanio, je 16. novembro 1930, kiam laboristoj de l' fabriko komencis strikon. Li rifuzis veni malsupren antaŭ ol la striko finiĝos kontentige por la laboristoj. Post 56-hora restado, dum kiu li, kun fulgigita vizaĝo, kuraĝigis la agitantajn laboristojn svingante ruĝan standardon k nur malmulte dormetis, la strikantoj, maltrankvilaj pri lia sorto, kun permeso de la polico, suprenirigis membron de l' Jokohama Godo-Laborista Unuiĝo, Kenji Sato, kiu suprenportis kelkajn manĝaĵojn al la viro sur la supro de la kamentubo.

Laŭ "Juna Azio" (jan. 1931).

LA KOLEKTIVIGO EN U.S.S.R. LAŬ FEDOR GLADKOV

La fama soveta verkisto Fedor Gladkov publikigis en la "Izvestia" (Sciigoj) informon pri la vivo en Sovetio de la "kolĥozoj" (kolektivaj bienoj, principe kulturataj de kamparan-asocioj). Tiuj artikoloj havas tonon de vero, kiun ni malkutimis pri la sovetaj temoj. Ili intense lumigas la kolektivigon de la terkulturo, tiun ĉi duan revolucion, pri kiu ni malmulte scias. Tial ni decidis ilin traduki.

La Alĝera esperantista grupo.

En la "stanico" (vilaĝeto) Pavlovskaja estas publikigata gazeto "La Kolektivano". Ĝi aperas ĉiujn kvin tagojn. Post nelonge, en Tiĥorock, sammaniera eldonaĵo naskiĝos. Tiuj regionaj bultenoj en la Kuban-regiono estas presitaj k redaktitaj en multaj lokoj de regionaj rimarkinduloj. Tio estas jam klerigo, kiun nun nepre

Vojaĝimpresoj de K-do Perer[1]

(Fino. Vd. n-ojn 324, 325, 326, 327, 328, 329.)

Miloj da kilometroj — mi veturas jen tra pinarbarego, en kiu svarmas somere la pik-kuloj, jen atingas senliman herbejon kun libere paŝtiĝanta brutaro. Vilaĝoj tre distancas unu de l' alia. Ĉie tamen oni renkontas homojn, kiuj bredas, laboras, ĉasas. Post Krasnojarsk mi retrovas montregionon kun alternado de arbaroj k kulturata grundo.

Tiam mi atingas la Bajkallagon. Oni kredus retrovi la Nigran maron. Ĉirkaŭita je ĉiuj flankoj de altaj montoj, kiuj gardas eternan neĝon, la lago prezentas neforgeseblan spektaklon. La verdo de l' montmalsupraj partoj kontrastas mirinde kun la belbrilega blanko de l' pintoj. Kaj ĉe la radikoj la "maro" (tiel nomas ĝin la loĝantoj) plaŭdetas kviete kun sia verda, kristala, malvarma, travidebla akvo.

Poste mi trovas altplatan, montozan regionon; tiam sablozajn stepojn kun nudaj, timigaj montoj, kie ĉiam blovas sekiga malvarmo aŭ somere varmega vento. Ni estas en Burjatio, mineralriĉa regiono. Flavrasaj popoloj vivas tie, burjatoj k mongoloj, kies ĉefa okupo estas brutbredado. Ili estas ĝis nun duonsovaĝaj, gastemaj, malpuraj, malkleraj, k loĝas en tendoj de rondkonusa formo ("jurtoj"), kies vandoj estas el bestfelo. Jurto ne havas kamentubon nek liton; ili hejtas per ligno, se ili havas, aŭ per bestgrasaĵo. La nutraĵo estas primitiva: ĉefe viando k malmulte da farunaĵo; trinkaĵo estas acidigita ĉevalina lakto k teo. Ankaŭ brandon ili multe trinkas. Ili estas denaturaj rajdistoj; oni kredus, ke ili naskiĝis sur ĉevaloj. Pro religio, ili ne purigas sin nek siajn vestojn. Ili estas budhanoj aŭ idolanoj. Kiam ili estas lacaj pro preĝado al iu dio, kiu ne plenumas iliajn dezirojn, ili tute simple batas la distatueton. Sorĉisto, kuracisto k pastro plenumas ĉe ili la samajn oficojn. Ili ne estas intermilitemaj.

Por fini miajn impresojn pri Sovetio, mi diru, ke la esperanta movado spite ĉiuj malhelpoj prosperas ĉie. Tamen ofte mi sentis ĉu malkaŝan, ĉu kaŝan kontraŭstaron kontraŭ esperanto de lokaj neesp-istaj organizoj. Ofte eĉ oni malhelpas aŭ bojkotas la propagandistojn, aŭ primokas ilin. En kelkaj lokoj, kie ili scipovis sin trudi, la esperantistoj jam instruas en iuj popollernejoj. Mi ankaŭ konstatis, ke en Sovetio tre malmultaj laboristoj aŭ kamparanoj estas esperantistoj. Tio estas komprenebla pro la iama senalfabeteco de l' popolamaso. Nun la lokaj organizoj provas forigi tiun malbonstaton. Per oftaj radiodisaŭdigoj ili atingas ĉiutage pli k pli grandan nombron da varbotoj.

Pri Manĉurio

Manĉurio impresis al mi kiel tipo de duonkolonia lando. La popolo estas malklera, malpura, apatia, komercema. Ekzistas rasa malamo inter ĉinoj k blankuloj, precipe kontraŭ rusoj. La Manĉuria popolo vivas tre mizere. La domoj estas ĉu el tero, ĉu el briko. Lito konsistas plej ofte el tapiŝoj fabrikitaj el maiza trunka ŝelo. Oni manĝas komplikitajn manĝaĵojn. La pano estas farita el nefermentita malmulte salita bakaĵo. Oni trinkas teon. La ĉefa trajto de ĉino estas portado de aĵoj sur nuko. Densa estas la loĝantaro. La tuta okupebla grundo estas prilaborita. Plej ofte la prilaboro okazas per ligna plugilo aŭ manfosiloj. Ili estas lertaj ĝardenistoj. Vojoj ankaŭ tie forestas. Ĉie vi vidas vicojn da portistoj, kiuj portas la ŝarĝon alkroĉita sur bastono, kiu lasta estas metita sur ŝultron.

La laboristoj en urbo laboras pli

[1] France: Peraire.

bezonas la sovetaj terkulturistoj. Tio estas senduba k karakteriza signo de la grado de socia k politika evoluo, atingata de la loĝantaro, kiu montras, kiel plifortigataj estas la novaj elementoj, en la vilaĝa taga vivo subite elŝprucantaj. La gazeto observas inteligente, atente k precize ĉiujn malsimplajn k kontraŭdirajn progresojn de vivrearanĝo. Ĝi batalas obstine por sistemo de kolektiva laboro, por pli rapida ritmo, por bolŝevika edukado de la popolamasoj. Regulaj regionaj konferencoj de laboristaj k kamparanaj korespondantoj pri la nunaj bataltaskoj, organizado de avangardaj brigadoj, pli da aktiveco pri la socialista konkura fervoro, diskonigo de la malfortaj punktoj k de front-traboroj en la diversaj laborsektoroj, vipbato al la mallaboremo, kreado de instigtaĉmentoj; tio ĉio estas revolucia novaĵo, k mirindaj naskiĝoj de la socialista socio. La gazeto estas interese redaktita; ĝi estas tute dediĉata al la nunaj laboroj; al la urĝaj aferoj, al la kondukindaj agitadoj. Ĝi denuncas la malfortajn punktojn; ĝi starigas la por ĉiu k ĉiuj gravajn demandojn, ĝi estas konciza k facile komprenebla. Tie oni trovas raporton pri problemoj de ĝenerala politiko, pri la taskoj de la regiona ekonomio aŭ ofte pri la nunaj, lokaj taskoj: oni trovas precipe tiujn lastajn. La gazeto estas viva politika k strategia organizanto: estas propagandanto, kiu plenumas la plej malfacilajn funkciojn.

Sed necesus vidi, sur kia papero aperas tiu eldonaĵo, papero, kiu memorigis al mi la epokon de la civila milito. Estas folio-ĉifonoj, diverskolora kunigo de forĵetinda pakpapero. Okazas, ke oni eĉ ne trovas tiujn forĵetaĵojn, de la kolektejoj rikoltatajn. Tiu aflikta paperkrizo reagas precipe sur la preskvanton: ĝi estas ridinde malmulta, dum la gazetmendo estas grandega. Necesas, ke la regionaj k centraj institucioj atente ekzamenu tiun situacion. Ekzistas motivo por forpreni la multvaloran paperon, uzatan de multaj malutilaj aŭ troampleksaj revuoj k ĝin direkti al la regionoj de plena kolektivigo. La atingota utila efiko estus multege pli granda. Ni helpus tiel batali kun pli da sukceso por realigi la kvinjaran planon ĉe la bazo, por plifortigi la kolĥoz-sektoron, por penetrigi la bolŝevikajn labormetodojn en la larĝajn amasojn de terkulturistoj.

Malgraŭ eksterordinaraj malfacilaĵoj, la gazetoj daŭras, laboras k ne pripensas ŝpari siajn fortojn. Ŝajnas, ke, se mankus eĉ tute papero k presliteroj, la gazetoj estus skribataj sur la palisaroj, sur la fenestrokovriloj, sur la pordoj, aŭ simple, la leteroj k la notoj de la laborist-kamparanaj korespondantoj estus najlataj k en la publikaj ejoj afiŝataj.

Jen, ĝis kia grado la regionaj gazetoj necesiĝis. Oni miras vidante ilian ĉefan karakteron: oni ne trovas fanfaronemon; ili ne iluzias pri sia propra valoro. Ili enhavas pli da prizorgemo pri la sorto de sia regiono, pli da malkontento ol da kontento.

En la "stanicoj" de la Tiĥorocka regiono, la loĝantoj de la kolĥozoj plendas k indignas, ĉar ili ne havas gazeton.

Estas same kvazaŭ ni estus mutaj, diras ili. Ni vivas en nia malgranda spaco, k ni ne scias tion, kiu fariĝas en alia loko. Nu, Tiĥorock nomiĝas urbo. Sen gazeto estas, kvazaŭ al ni duone mankus gvidado. Estas vere, ke ni havas, ekzemple, telefonajn interrilatojn, sed, telefone ne multe estas eble interparoli.

Malgraŭ abundo da manuskriptoj

ricevitaj en la redaktejo ni ankoraŭ ne povas pensi pri pligrandigo de "S-ulo" tiom longe, kiom ne estos reatingita nombro da 4000 abonantoj.

VARBADU SENĈESE, K-DOJ, KIAM K KIE AJN VI POVAS, por kompensi la provizoran perdon de l' sovetia abonantaro.

---

ol 10 horojn tage. La salajro, kiun ili ricevas, estas tre malalta. Senalfabeteco estas grandega, kulturlaboro nula.

Komerci estas por ĉinoj la ĉefa idealo en Manĉurio. Multajn almozulojn mi vidis. Grandkvante mi rimarkis haŭtmalsanojn. La registaro estas malkaŝa militista diktaturo. Soldata kasto havas ĉiujn rajtojn. Ajna kunveno, ĉu ĉe ĉinoj aŭ blankuloj. estas severe malpermesita. Ili ne estas tiel gastemaj kiel aliaj popoloj orientaj, komprenebie pro tio ke ekzistas instinkta k edukita malamo kontraŭ eksterlandano. Lernejoj k preĝejoj estas treege malmultnombraj, precipe en la kamparo.

La armeon formas volontuloj. Mi rimarkis tre maljunajn k ankaŭ tro junajn soldatojn. La disciplino estas malrigora, militinstruo ankaŭ malkompleta. Ridindaj estas iliaj kostumoj kun griza koloro, grandaj ĉapoj, sandaloj sur la piedoj.

Rusoj k angloj estas tie la ĉefaj koloniistoj. Ekzistas sovetaj k enmigrintaj blankaj rusoj. Multaj el ĉi lastaj servas kiel ĉinaj policistoj. Ĉiuj ĉi enmigrintoj, eksoficiroj caraj, eksbienposedantoj aŭ eksĝendarmoj, atendas kun korespero la taŭgan momenton por reiri Rusion. Ili sincere kredas, ke la rusa revolucio baldaŭ mortos. Ekzistas en Manĉurio banditaj bandoj nomataj *Ĥunĥuzoj*, formitaj el forkurintaj rusaj eks-soldatoj k ĉinoj. Ili teroras la tutan orientan parton. Persone mi ne vidis ilin. En Manĉurio revoluciema ĵurnalo estas malpermesita.

Pri turismo. Apud soveta okcidenta landlimo oni trovas dezertan sablan parton, kie abundas multe da ĉasaĵoj. En la sablaj montoj aŭ ebenaĵoj kreskas malgrasa herbo, kie paŝtiĝas brutaregoj. Limas tiun dezerton belaj montoj. Poste venas granda ebenaĵo, kie la tuta grundo estas prilaborita. La ĉinaj farmbienoj konsistas el izolitaj farmdomoj. Konstruitaj el tero ili aspektas kiel kvadrata malalta fortikaĵo. La urbaj stratoj estas plenigitaj je fantaziaj reklamŝildoj. La orienta parto de Manĉurio ĝis Japana Maro (Pacifika Oceano) prezentas belegajn verdajn montojn. Ankaŭ tie ĉinaj kamparanoj okupis kiel eble plej grandan parton da grundo. Apud riveroj aŭ marĉoj, la grundo estas transformita en rizkulturejon. Homoj laboras en akvo ĝis genuoj; febro k kuloj furiozas. Ju pli oni alproksimiĝas la maron, des pli la lando estas bela. En tiu sezono belaj floroj kreskas ĉie. Arbaraj montoj intermitas kun surmontaj kulturitaj kampoj. La klimato estas somere tre pluvema.

Esperantistoj troviĝas en ĉiuj grandaj urboj. Estas ĉu rusoj, ĉu japanoj. La amaso estas tro malklera ankoraŭ por interesiĝi pri esperanto. Cetere estas severe malpermesite malfermi kursojn. Mi mem kelkfoje estis suspektita pro la verda stelo. Mi rimarkis inklinon por naciliberiga movado. Sed mi opinias, ke unuflanke la popolo estas tro malklera, aliflanke la potenculoj tro malcertaj pri si mem, malkuraĝaj antaŭ danĝero k tro arogaj antaŭ subuloj, por sukcesi ion ŝanĝi.

*

Parto de mia vojaĝo estas plenumita. Mi volus ĉi tie trovi la trafajn vortojn por dankegi la esperantistaron, kiu en ĉiuj landoj, en ĉiuj lokoj zorgis por mildigi la malfacilaĵojn de mia vojaĝo.

Mia vojaĝplano estas nun, post Japanio, — Aŭstralio, Ameriko, Nord-Afriko, Sud-Eŭropo, antaŭ la reveno. Mi tute ne dubas, ke same kiel pasinte, min akceptos varme ĉiuj esperantistoj. Por k per esperanto mi daŭrigos, spite ĉio, mian vojaĝon.

Verkita en Vladivostoko la 6-an de julio 1930.

Atentigo! K-doj metu sur siaj leteroj al la Redakcio ĉiam siajn nomon k adreson!

En tiuj malproksimaj lokoj, la gazetoj anstataŭas la maloftajn venojn de gastoj el la regiona direkcio, de okazaj vizitoj de la najbaroj aŭ de regionaj konferencoj en Tiĥorock.

Kelkfoje partiaj k sovetaj oficistoj alvenas ĝis tiuj lokoj k raportas pri la regiona situacio. Tiuokaze, oni organizas kunvenojn de la ĉeloj k de la sovetgvidantaro en la "stanico". *Tiuj* kunvenoj daŭras longe, iufoje post noktomezo, k oni remetas la daŭrigon ĝis la morgaŭa mateno. Estas tiom da nesolvataj demandoj, tiom da urĝaj necesoj, kiujn oni ne povas ekzameni dum kelkaj horoj. Ĉiu rapidege ekparolas, ĉiu amasigas problemojn k postulojn; tial estas tute maleble sin tuj orienti. Tamen necesas solvi la demandojn, flankenigi la malfacilaĵojn; praktikaj rimedoj devas nepre esti trovataj; la eraroj k la difektoj necese devas korektiĝi.

Tiuj kunsidantoj havas specialan rimarkindan proprecon: ili kritikas sin mem senkompate. Ili ne kontentiĝas plendi pri sia senpovo aŭ pri la regiona estraro aŭ pri la partia direkcio; ili juĝas tre realisme, tre severe sian propran laboron; ili mokas senindulge siajn malsukcesojn; ili estas senĉesa dolora esplorado pri novaj labormetodoj, pri nova alternado por la kamparanoj, celante renovigi la terdistribuon k la sociajn interrilatojn. (Daŭrigota.)

LA ANARKISTO

Elizeo Reklu (Reclus)

Laŭ la difino mem, la anarkisto estas la libera homo, kiu ne bezonas mastron. La ideoj, kiujn li konfesas, estas efektive liaj per la rezonado; lia volo, naskiĝinta el la kompreno pri aferoj, koncentriĝas al celo klare difinita; liaj agoj estas la senpera realiĝo de lia persona intenco: Flanke de ĉiuj, kiuj pie ripetas la parolojn de aliulo aŭ la tradiciajn redirojn, kiuj volonte submetiĝas al la kapricoj de potenca individuo aŭ, kio estas ankoraŭ pli grava, al la ŝanceliĝoj de la amaso, nur la anarkisto estas homo: sole li konscias pri sia valoro antaŭ ĉiuj tiuj molaĵoj, tiuj nefirmaj homoj, kiuj ne kuraĝas vivi sian propran vivon.

Sed tia anarkisto, kiu morale liberiĝis el la superregado de aliulo k kiu neniam kutimiĝas al iu ajn el la materiaj subpremoj, kiujn uzurpuloj pezigas sur lin, tia homo ne ankoraŭ estas sia mastro tiom longe, kiom li ne liberiĝis el siaj neprudentaj pasioj. Li devas koni sin mem, liberiĝi el sia propra kaprico, el siaj senbridaj impulsoj, el ĉiuj siaj heredaĵoj de prahistoria animalo, ne por mortigi siajn instinktojn, sed por harmonie agordi ilin kun la tuto de sia konduto. Liberiĝinte el la aliaj homoj, li same devas liberiĝi el si mem.

Se la anarkisto sukcesas koni sin mem, per tio li konos sian medion, la homojn k la aferojn. La observado k la eksperimento estos montrintaj al li, ke per ili mem ĉiu lia firma kompreno pri la vivo, ĉiu lia fiera volo restos senpovaj, se li ne kunigas ilin al aliaj komprenoj, al aliaj voloj. Estante sola, li estus facile dispremata, sed, fariĝinta forto, li opigas sin kun aliaj fortoj, konsistigantaj perfektan unuiĝon, ĉar ĉiuj estas ligitaj per samopinieco, per simpatio k bonvolo. En ĉi tiu nova socia korpo, ĉiuj kamaradoj estas egaluloj, montrantaj reciprokan respekton k samajn signojn el solidaro. Ili estas denun fratoj k mil ribeloj de izoluloj transformiĝas en kolektivan depostulon, kiu pli-malpli frue starigos la novan socion, la Harmonion.

LA NUNA EKONOMIA KRIZO EN GERMANIO K LA SINDIKATOJ

La artikolo de K-do Zehrer en n-o 326 de "S-ulo" ne povas resti nerespondata. Permesu do al mi kelkajn liniojn pri la temo:

K-do Z. malkontente konstatas, ke la sindikatoj dum 1929 elspezis por senlaboruloj k malsanuloj 87 milionojn k por laborbataloj (strikoj) nur 13,5 milionojn. En tiu ĉi momento mi ne povas kontroli tiujn nombrojn, sed ni supozu, ke ili estas korektaj. Ni ne malatentu, ke la ekonomia situacio ne ebligis multe da strikoj. Striko estas prudenta, se la cirkonstancoj donas ian ŝancon al ĝi. Estus frenezo striki nur pro la striko. Kaj la ŝancoj ĉiam estas diktataj de la konjunkturo[1]. Kaj la konjunkturo depost jaroj en Germanio estas tiom malbona, ke strikoj nur malofte estas eblaj, t. e. donas ŝancon de venko. En tia situacio la taktiko de "ekonomia demokratio" ne estas forĵetinda: al ĝi apartenas ankaŭ la sistemo de arbitraciaj tribunaloj por laborbataloj. En tre multaj kazoj, en la plej multaj eĉ, nur per la decidoj de tiuj tribunaloj la laboristaro povis atingi iajn plibonigojn de tarifoj. Certe ili ankaŭ ofte decidis malfavore al la laboristaro. Nu, ankaŭ strikoj ne ĉiam estas gajnataj . . .

[1] Cirkonstancaro. — *Red.*

K-do Z. speciale memorigas pri la striko de metallaboristoj en Berlin; do ĝuste pri ĝi mi ankaŭ parolu. Jam ĉe komenco de tiu striko mi estis konvinkata — verŝajne ankaŭ la sindikatestroj — ke la ŝanco je venko estas nula! Oni decidis strikon — pro prestiĝo. Inter metallaboristoj estas multe da neorganizitoj. Multaj estas senlaboraj — ĝenerale metallaboristo en Berlin, kiu fariĝas senlabora, povas kalkuli kun senlaboreco de 1—2 jaroj. En tiun situacion trafas la postulo de la entreprenistoj malaltigi la salajrojn. Ilin helpis la duonfaŝista registaro Brüning. La sindikato proklamas la strikon k post du semajnoj interkonsentis strikfinon k postan traktadon pri la tarifo. Tio certe estis malbona interkonsento. Sed kial ĝi estis farata? Ĉar jam la fronto de strikantoj komencis disiĝi. Ĉar la neorganizitoj komencis kuri en la fabrikojn. Se la sindikato estus atendinta ankoraŭ du, tri tagojn, tiam ne unu neorganizito restus strikanta. Pruvo estas la fakto, ke la granda fabriko de Zimens *(Siemens)* ricevis la permeson, rekomenci la laboro kelkajn tagojn pli frue, sen antaŭa voĉdono pri strikfino. Tio ne okazis por plaĉi al Zimens, sed ĉar oni ne plu povis eviti la enkuron de la laboristoj. Nu, oni diras, jen la sindikato faris la eraron, ke ĝi ne donis subvencion al neorganizitoj, ke oni diris: "Kiu ĵetis ion en la grandan poton, tiu ricevos". Ĝusta k justa diro. Estas aroga postulo, estante kontraŭulo al sindikato tamen ĉe striko atendi monon de ĝi. Tamen la subteno al neorganizitoj depost la tria striksemajno jam estis planata. La tuja (depost la unua striktago) subteno al neorganizitoj certe estus ebliginta strikon tri- aŭ kvar-semajnan, eble iomete pli bonan sukceson ĉe la intertraktoj. Sed ĝi estus havinta plej malbonan efikon al la forto de la sindikatoj, konsekvence pli malbonajn tarifojn estonte. Ĉar ĝi subfosus ĉian sindikatan moralon: Varbotoj dirus: Kial aniĝi? se oni strikas, tiam mi ja certe ricevos el la "granda poto", en kiu la aliaj enmetis! Kaj anoj de sindikatoj kun ĉagreno forirus, ĉar ili ne povus toleri, ke iliaj groŝoj pene ŝparataj estu donataj al uloj, kiuj ne ekkonas, kien ili apartenas.

Por relative tre modera sumo
vi povas akiri libron de daŭra valoro:

PLENA
VORTARO DE ESPERANTO

La unika lingva konsultilo por ĉiu esperantisto!

536 paĝoj. Form. 14×20 cm.
Prezo: bindita 10 mk. g., broŝ. 9 mk. (afrankite).

SAT *23, rue Boyer, Paris XX, aŭ Colmstr. 1, Leipzig O 27.*

La akra krizo certe radikaligas la germanan laboristaron. Sed ne malatentu, ke tiu radikaligo nur estas ŝajna. Senlaborulo tre facile estas ĉagrena pri ĉio ajn. Kiam li denove havas laboron, tiam ankaŭ lia opinio pri politiko k ekonomio fariĝas pli trankvila.

La sindikatoj ne povas pro la nuna krizo grandega ĉie propagandi strikojn, kiuj ne havas ŝanceton je sukceso. Ili devas zorge administri la havon de la laboristaro por esti batalpretaj, kiam batalo necesas k venko estas ebla. Estas tre facile, insulti la gvidantojn. Sed ni ne forgesu, ke ni mem elektis ilin, ke ili respegulas la volon de la anaro.

La laboristoj en la laborejoj tute ne estas radikalaj. Ili estas tre silentaj, timemaj. Ili scias, ke ĉiutage ilin minacas la sorto: iĝi senlaboraj. Kaj vidante la senlaborulojn inter siaj konatoj, ili timas la saman sorton. Kun tia laboristaro oni ne povas fari grandajn batalojn. La krizo detruas korpojn k spiritojn.

Por eviti malicaĵojn mi volas aldoni, ke mi ne estas sindikata gvidanto k ke mi sufiĉe povis "gustumi" senlaborecon: nuntempe mi estas senlabora, dum 1930 mi laboris nur ses monatojn.

Adolf Sproeck.

Samsencan skribaĵon ni ricevis de K-do Forto (12 971). Ĝin ni konigas nur resume, ĉar ĝi entenas multon jam diritan de K-do Sproeck. Li skribas: "Estas tendenca troigo, se la "liberaj" sindikatoj, la ĉefa movado por plibonigo de l' laboristaj vivkondiĉoj en Germanio, estas montrataj kiel subvenci-asocioj. Certe, rilate al la socia leĝdonado ŝtata la sindikatoj ludis gravan rolon. "R.G.O." (ruĝa sindikata opozicio) ĝis nun nenie sukcesis longdaŭre ligi al si la neorganizitojn. K-do Zehrer citis strikon tramistan en *Kemnic* (Chemnitz). Ĝi neniel rilatas al sindikataj aferoj. Kiel pretekston oni uzis redukton de l' labortempo. Fakte temis pri politika striko, kiu estis necesa pro la intencitaj "malsatmarŝoj".

TRA ESPERANTIO

KOMUNIKO DE LA DIREKCIO

Ni ricevis de la Kontrolkomitatano, K-do Jeanneret, Bruselo, deklaron, per kiu li eksiĝas el la Kontrol-Komitato. Sian eksiĝon li motivigas per longega, agiteca artikolo, en kiu li solidariĝas kun la opozicia frakcio, k alproprigas al si ties mensogan k kalumnian argumentadon, kiun niaj membroj jam plensufiĉe konas. Tial ni ne volas misuzi 4 paĝojn de nia gazeto por represi lian skribaĵon. Tiu eksiĝo estas cetere neniel miriga, ĉar K-do J. estas kompartiano; li simple ludis en la K. K. la rolon, kiun al li difinis la stabeto de la Komfrakcio.

Novaj estas nur asertoj rilataj al la sinteno de l' K.-K., kiu laŭ li estas "direkcia ilo por skismigi SAT"! Li malaprobas ĉiujn eksigojn, asertas, "ke la kulpigitaj K-doj agis tute lojale k en la interesoj de la lab. esp. movado, sed ke kontraŭe la nuna direkcio k redakcio de 'S-ulo' daŭre rompis la statuton maldemokratece subigante ĉiujn alipensantojn, reviziante la klasbatalajn principojn de SAT". (?!?!) Alia aserto estas, ke ni rifuzis liveri al la K. K. dokumentojn kontraŭ ni direktitajn (Ni liveris ĉiujn, kiujn ni havis!), ke ni aldonis 26 liniojn al la teksto de l' K. K., aperinta en n-o 324 (dum ni ŝanĝis aŭ aldonis neniun vorton!), por konkludi, ke la K. K. estas tute dependa de la Direkcio. Malfeliĉe por li — la citoj, kiujn li faras el leterinterŝanĝo okazinta inter K. K. k la Direkcio, pruvas ĝuste la malon: ke la K. K. ofte malsamopiniis kun la Direkcio k sekve decidis tute memstare.

Estas evidente, ke lia eksiĝo estas nura politika elpaŝo — rezulto el lia disciplina submetiĝo al la ordonoj de parti-frakcio, kiu ĉiel subfosas nian agadon k celas revizii la principojn de nia organizo.

K-do Berĵje, la sekretario de K. K., al kiu ni konigis la dokumentojn de Jeanneret, facile rebatas per respondartikolo ĉiujn dirojn de sia eks-kolego en K. K. Ni rezervas al ni publikigi lian respondon, se necese.

*

Ni ne dubas, ke la Brusela SAT-anaro, kiu elektis tiun ĉi K. K. (vd. n-on 311), en baldaŭa kunveno kompletigos la konsiston de l' K. K., por ke ĝi povu regule daŭrigi siajn laborojn laŭstatute farendajn. Pri tio ni komunikos ĝustatempe.

EL NIAJ LETEROJ

"...Laboristo ekkonas pri esperanto... Li estas entuziasmigita, deziras konatigi ĉiujn amikojn, ĉiujn, kiuj povus interesiĝi pri ĝi, k miras pri la spertata indiferento rilate al tiu ĉi afero. Tre surprizas lin, ke ĉe la partio, al kiu li apartenas, la indiferento estas treege granda, kvankam ĝi povus tuj efektivigi la veran internaciecon. Nur iom post iom li ekkonas la kialon. Ankaŭ esperanto devas batali por venki la 'internaciistojn'.

"Komence mi tute ne sciis, ke ekzistas laborista esp. movado. Movado, kiu klopodas penetri en la laboristajn organizojn. Mi eksciis pri SAT, ĝiaj celo k taskoj tiel bone esprimitaj en la libreto *La Laborista Esperantismo*. Mi post-aĉetis ĉiujn antaŭ mia aliĝo aperintajn jarkolektojn de 'S-ulo' k 'Sennacieca Revuo' — k volas resti por ĉiam ano k kunbatalanto de nia movado. Mi estas socialdemokrato, sed ne fanatikulo. Mi komprenas, ke ne la partia taktiko estas la esenco de la socialisma movado, sed la firma volo pereigi la kapitalisman sociordon per la fortigo de l' laboristaj organizoj — kiuj plej bone fortiĝos per kleriga, eduka k kultura laboro.

Mi treege simpatias al Sovetio, al ĝia estinta revoluci-batalo. Ne, ne, — 'S-ulo' ne reformiĝis, sed ĝi plie simpatiigis la socialdemokratojn por Sovetio. SAT ne estas komunista, nek socialista, sed ĝi amikigis socialdemokratajn laboristojn kun sovetianoj. Per sia superpartieco ĝi semis la ĝermojn por la estonta Unuigo de la tutmonda proletaro. Mi tute ne komprenas la sovetiajn esperantist-gvidantojn. Ĉu tute mankas al ili psikologio?" (10 504.)

*

"Antaŭ mi kuŝas ĵus ricevita letero de mia korespondanto el Rusio, K-do 15 ..., kiu petis min antaŭ kvaronjaro, ke mi abonu por li 'S-ulo'n. Kvankam mi estas senlabora k devis kunserĉi la necesan monon por plenumi lian peton, li sciigis, ke li nur ricevis la n-ojn ĝis 314, t. e. du ekzemplerojn el la lasta kvaronjara abono. Pri la kialo K-do 15 ... sciigas. Mi kopias laŭvorte la ricevitan tekston: Opozicio de SAT deklaris, ke 'S-ulo' fariĝis privata tribuno de K-do Lanti k aliaj liaj proksimaj amikoj, k tial ĉiuj klasbatalemaj geesperantistoj devas bojkoti 'S-ulo'n kiel malutilan ne proletan ideologion, kiu estas enkondukata de Lanti en SAT-anaro. Mi pensas pri tio, ke mi ne

Aperis ĉe SAT-KOOPERATIVO
la belega fantazia romano
de A. Bogdanov
RUĜA STELO
kolektive el rusa lingvo tradukita sub redakto de N. Nekrasov k S. Rublov.
Formato 12×18 cm. 168 paĝoj.
Prezo: **1.60 mk. g.** — Tre leginda libro.
Mendu tuj ĉe Administracio de SAT Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germanio

ricevis 'S-ulo'n simple tiel, ke Centra Komitato de SEU ne tralasas ĝin al mi k al aliaj K-doj vivantaj en Rusio."

"Sennaciece K-do Leber Raimund (13 912), ... Wiener Neustadt."

Voĉoj el Sovetio

Unu el multaj

"K. K.! 10. XI. 30.

"Aperis 'Internaciisto'. Verŝajne vi jam ĝin havas k estas bone informita pri ĉio. En 'Deklaro', kiel vi vidas, ne troviĝas eĉ unu vorto pri la mono. Rimark-
S
inda fakto. Nu, kion do fari? Ĉu plori, ĉu malbeni la sorton? Ne, tute ne! Kun malpacienco ni atendas vian respondon
u
al la paŝoj de l' 'opozicio'. Atentu: la bultenaĉo de CK de SEU ne aperas. 'Internacia Lingvo' ankaŭ ne. . . . sed monon
b
por 'I-isto' oni posedas. Ili pretas akcepti abonon ktp. Ĉu do estas eble ĝin transsendi Germanion? Kial do ne estas
p
eble pagi la monon al SAT?

Ne necesas miri, se en iu sekvonta n-o de 'I-isto' aperas novaj subskriboj
r
sub 'Deklaro'. Oni ne povas paroli en nuna situacio pri sincero, vera konvinko ktp. Ne estas ebla transsalti sian
e
kapon. Monon por la 'Plena Vortaro' mi repostulis de CK de SEU (ĝis nun tamen ne ricevis!) Ne miru, se iu rifuzos ricev-
m
adi plue 'S-ulo'n. Entute miru pri nenio, kio okazos... Estas nur individuaj K-doj, kiuj ne dormas, la granda
o
amaso el niaj SAT-anoj — estas ŝafoj... Komprenu nin. Sovetiaj SAT-anoj ne iras kun D(rezen). Bonsukceson. Via ...†††"

ĈE LA NEŬTRALULOJ

En Japanio okazis dum 1930 kursoj, plejparte mallongtempaj, sume en 30 urboj, 58 fojojn kun proksimume 1000 kursanoj; propagand-kunvenoj, plejparte kun paroladoj k ekspozicioj sume en 10 urboj, 43 fojojn, kun proks. 10 mil aŭskultantoj. (Ĉi tiuj aranĝoj estis faritaj nur de l' Esp. Propaganda Asocio en *Kameoka*, sekve rilatas nur malgrandan parton de la tuta propagando). Tiuj nombroj multobliĝas, se oni alkalkulas la laborojn faritajn de la Japana Esp.-Instituto, de Kiboŝa k. a. lokaj grupoj. En 1930 japanaj esp-istoj kreskis sume je almenaŭ 20 mil novaj adeptoj.

Protektanto al la universala kongreso de l' neŭtraluloj okazonta ĉijare en Krakovo estas . . . marŝalo Pilsudski! O. Bujwid, kiu redaktas la "neŭtralan" gazeton "Pola Esperantisto", laŭdas en artikolo la agadon por paco k ordo de Pilsudski k riproĉas la polajn civitanojn, kiuj kontraŭstaras lian politikon. — Vivu neŭtraleco!

En Liono (Lyon) la Esperantista Amikaro (adr. 7, rue de la Tunisie, *Lyon*) eldonigis kajer-kovrilon por lernantoj, sur kiu la kutima multobliga tabelo estas anstataŭita per la tuta esperanta gramatiko.

En Parizo fondiĝis societo, nomata "Esperanto k Komerco" (sekretariejo: 23, rue Notre-Dame-des-Victoires, Paris 2-e), kiu celas doni informojn rilatajn al komerco, vendo aŭ aĉeto en Francio k. s.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Okamoto-Rikiĉi, Evangelio de Pura Amo. *Evangelio de Belismo, Volumo IV.* Belisma-Koopera Kulturejo. Tomioka-mura, Ŝuntoo-gun, *Ŝizuoka-ken,* Japanio. 36 pĝ. Form. 12×19. Prezo: 0,25 jeno.

En tiu ĉi 4. libreto (la 3. ni ne ricevis!) la aŭtoro, filozofanta ateisto, polemikas kontraŭ amo de l' kristanismo k aliaj religisistemoj, asertas, ke la solan puran amon donas religio pri Belo ("belismo"), ĉar ĝi estas tuthomara, universa. La aŭtoro alude prezentas malpreciżajn ideojn pri batalo kontraŭ kapitalismo k milito k por ideala socio sen ekspluatado. La tuto suferas pro troo da hipotezoj prezentitaj sub fraz-abundo ne ĉiam servanta al idea klaro. Preseraroj troas. La neologismo "mutuala" (pĝ. 15) ŝajnas nenecesa (= reciproka). *N. B.*

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

The Bournemouth Times & Dir., 2. 1., Vojaĝimpresoj (Perer); *El Socialista,* Las Palmas, 4. 12., Ateista mov. en Barnaŭl.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

L'Effort, Lyon, 20. 12., 27. 12., 3. 1.; *Sächs. Arb.-Zeitg.*, Leipzig, 27. 12.; *Volksblatt,* Bochum, 1. 12., 2. 12., 4. 12., 6. 12., 9. 12., 12. 12., 15. 12., 16. 12., 17. 12., 22. 12., 23. 12., 24. 12., 27. 12., 30. 12., 31. 12.; *Signalen,* Stokh., 1. 1.; *Neue Zeitg.*. München, 1. 12., 4. 12., 8. 12., 11. 12., 18. 12. (grupsciigoj); *El Socialista,* Las Palmas, 13. 11., 18. 12.; *The New York Times,* 27. 4., 20. 5., 23. 8. 30; *Daily Worker, Novj.*, 12. 6. 30; *Daily Herald,* London, 11. 9. 30; *Militanta Ateisto,* Kiev, 13. 12. (ankaŭ alvokoj en esp-o); *The Labour Woman,* London, jan. (rubr.).

NIA POŜTO

8270. — Ne necesas postliveri la malnovajn gazetojn kun priesp. notoj.

Laborulo. — Ni ricevis la fotobildon, sed ne aperigos en "S-ulo". *Red.*

NEKROLOGO

La 5-an de jan. mortis sekve de trafikakcidento nia K-do

J. H. Warrink

SAT-ano 1939, en aĝo de preskaŭ 66 jaroj.

Nia grupo perdas per li unu el siaj plej bonaj membroj, kies fervoro k laboremo povas esti ekzemplo por multaj malpli aĝaj K-doj. Li lernis esp-on, kiam li estis jam 50-jara k aliĝinte al nia grupo k al SAT, li estis ĉiam preta labori k oferi por nia movado tiom, kiom li povis.

Ni ne forgesos lin.

Lab. Esp. Grupo, Enschede (Nederl.)

KORESPONDADO

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Fanĉi Inemanová, Rokyeanova 16, *Plzen, XI,* kĉl, L, PI. Ĉiam resp.

ESTONIO

— *40 estonoj* dez. koresp. Adr.: Junsocialista Esp.-Grupo, pk. 367, *Tallinn.*

FINLANDO

K-do Sulho Lehto, Postitoimisto, *Turku,* interŝ. jubileajn PM kontraŭ bonaj eksterlandaj.

FRANCIO

K-do Guillemeau, 8 rue Albouy, *Paris 10,* pri ĉ. temoj kun Sovetio k Germanio.

GERMANIO

K-do Karl Roth, Friedhofstr. 5, *Mannheim-Neckaraŭ,* kun Japanio, Ĉinio, L, PI, pri ĉ. temoj.

K-do Franz Kropf, Breite Str. 34, *Ronsdorf-Wuppertal,* kĉl, pri ĉ. temoj, PK, PI, bfl.

— "Mühlheima Naturamika Grupo Laborista" koresp. kĉl, L, PK, PI, ankaŭ flugpoŝte, pri ĉ. temoj. Adr.: V. W. Appelhans, Liebknechtstr. 1, *Mühlheim/Main.*

K-do A. Friedrich (25 j. fraŭlo, pentristo), *Buscheller,* Poŝto Ebersdorf b. Koburg (Bavario), pri div. temoj ankaŭ kun K-dinoj, mi estas komencanto. Nepre resp.

HISPANIO

K-do Enrique Nieto Echevarria, str. San Francisco 10—12, *Caditz,* L, PI, kun Ruslando, nur kun fraŭlinoj.

HUNGARIO

K-do Rudolf Hrach, Erzsébet-str. 74, *Pesterzsébet,* kĉl, pri ĉ. temoj, preferinde kun tramistoj.

K-do Francisko Dobos, Dob-str. 82/14, *Budapest VII,* kĉl, pri ĉ. temoj, PI.

— 10 kursanoj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Adr.: Josefo Stern, Szondystr. 42/c, I, 16, *Budapest, VI.*

NEDERLANDO

K-dino Trompettes (fraŭlino), Prezident Brandtstr. 11, *Amsterdam.*

SOVETIO

K-do Mikaelo Voronov, Petrovskaja, 3, *Nikolajev,* kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

SVEDIO

K-do Th. Johnzon, *Gyttorp,* kĉl, pri ĉ. temoj.

USONO

Letervespero! — La loĝio "Stadt" (I.O.G.T.) aranĝos letervesperon la 22. februaro 1931. Gek-doj k abstinenculoj bv. skribi al: Anton Andersen, 830, 56 St. *Brooklyn, N. Y.*

Ateistoj — Liberpensuloj Tutmondaj

Ruhr-regiona komuno de prol. liberpensuloj (Gemeinschaft prol. Freidenker) serĉas kontakton kun samtendencaj organizoj ĉiulandaj. Ĉion oni sendu al adr.: Fritz Schäfer, Dornröschenweg, 21, *Dortmund-Eving* (Germanio). !

ENHAVO

pago

La malpermeso al "En la Okcidento nenio nova" — akuzo kontraŭ la germana naciismo . . . 137—38
Hispanio — ĝia evoluo de 1923 ĝis hodiaŭ . . . 138—39
Pri la germana faŝistaro . . . 139
La klasbatalo tra la mondo . . . 139—40
La kolektivigo en U. S. S. R. laŭ Fedor Gladkov . . . 140—42
Vojaĝimpresoj de K-do Perer . . . 140—41
La anarkisto . . . 142
La nuna ekonomia krizo en Germanio k la sindikatoj . . . 142—43
Tra Esperantio . . . 143—44
Korespondado . . . 144

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)